



## Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 5-a de Marto 2018

**Ĉeestantoj:** Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Ŝlomo Ŝaĥar, Asaf Ĥefec, Dror Gaon, Eran Vodevoz, Matilda Landaŭ, Mikaelo Lineckij, Gabi Zeevi.

**Gastoj:** Joela, Miĥal, Doron, Amos Ŝapira

*Protokolo de la antaŭa kunsido (5-a de februaro 2018) – publikigita en la retejo.*

### **1. Raportoj** (Amri)

a) Aperis reklamo pri Akko/Eilat en la marta n-ro de la Revuo Esperanto (okona paĝo).

b) La 16-an de junio okazos tutmonde KER-ekzamenoj. La direktorino, Katalin Kovats, invitis israelajn e-istojn partopreni en speciala KER-sesio okazonta tiudate en Israelo. Minimume devas aliĝi 5 ekzamenitoj ĝis la 15/3 – *Ne estas kandidatoj!*

c) Mikaelo: Por kartludo en la klubo mi bezonas 5 pliajn homojn, famajn iamajn israelajn e-istojn kun 4 difinitaj detaloj, - kiujn li momente ne havas, - pri kiuj eblas ludi. Jehoŝua: kontaktu min, mi liveros la detalojn.

ĉ) Joela: 1. Dum la klubaj vesperoj multfoje NE ĉeestas nek unu aŭtoritato en la lingvo E-o. La klubanoj ne scias, ĉu ili uzas la lingvon bone aŭ ne, ili ne havas lingvan apogon. Kiel solvi la problemon? 2. La financaj raportoj kiujn la membraro ricevas, NE estas sufiĉe detalitaj, ne estas kompreneblaj. Ŝlomo, Amri, Jehoŝua, Gabi: kiel vi imagas detaligi pli?? 3. Dum la venonta kunsido Joela kaj Lea *petas tempon prezenti siajn rimarkojn, plendojn, proponojn pri la akumulitaj problemoj!*

### **2. Esperanto-kurso en Tel-Avivo** - (Doron, Amri)

a) Doron kaj Amir organizis la grandajn afiŝojn en apudurboj de TA por preskaŭ 5000 ILS. Ĝis nun venis nur 6 telefonvokoj, kvankam la komenco devas esti je la 12 de marto.

b) Doron proponas: Haarec povas aperigi duonpaĝan reklamon semajnfine, en la kultura suplemento "Galeria. Ties legantaro eble interesiĝos. Post marĉandado de Doron la petata prezo estas ĉ. 4100 sikloj. Decido: Doron devas plu-marĉandi, por eventuale akiri pli bonan proponon. Voĉdono: *Unuanime akceptita!*

c) Amri reklamis per Facebook por 500 ILS, la reklamo aperos dum 8 tagoj. Ĉ. 2000 personoj estis atingitaj dum du tagoj, kaj 50 "ŝatoj".

ĉ) Enkonduka leciono 12/3 - kion prezenti? – ĝeneralajn sciojn pri la lingvo... Ĉu emfazi, ke E-o estas facileca lingvo? – NE! Verŝajne estas la PLEJ facila, sed kiel ĉiu lingvo, bezonas lernadon, kaprompon, diligentecon, ktp.

d) Mikaelo: Indus mencii en la reklamo ke estas ebleco lerni E-on en kursoj faritaj por ruslingvanoj! (li pretas instrui, havas emon kaj materialon).

2/...



### **3. La 18-a IK en Akko** 3-5 de majo, 2018 (Amri)

- a) Ĝis nun aliĝis 20 personoj, ĉu pliaj?
- b) Gastejo - 9 ĉambroj (7 dultaj, 2 unultaj, 4 homoj sen tranoktado en la gastejo)
- c) Programo - ekskurso: vendrede Haifa, sabate Akko. Kleriga programo – ankoraŭ ne fiksita. Mikaelo kaj Jehoŝua prezentos, sed ni bezonas plenigi 4 horojn, du ĵaŭde kaj du vendrede inter 5-7. Amri mem prelegos, kaj serĉos ankaŭ aliajn.
- ĉ) Jehoŝua: programeroj en Ĥaifa: urba muzeo, germana kolonio, japana muzeo, Bahaa centro. Tagmanĝo en Vadi Nisnas. [Intertempe iom ŝanĝiĝis: unue Bahai, poste Tikotin].
- d) Eksterlandanoj - ĝis nun nur Ĵomart kaj Nataŝa.
- e) Antaŭ- kaj Post-IK-aj ekskursoj (3/5 kaj 5-11/5) – tiujn la supraj gastoj plene pagos.
- f) Buĝeto - takso: 2000 NIS de kotizoj (laŭ 100 NIS). Repago al la artistoj: ĉ. 5000 NIS (4000 flugoj, 1000 NIS gastejo). Ĉu plialtigi la kotizon por eviti deficiton? Decido: *Ne, post la publikigita reklamo oni ne povas malaltigi la pagon por la gastoj, nek altigi la kotizon de la partoprenantoj.* La kaso de ELI pagos la diferencon (Por la kurso – eble 6 personoj - ni elspezis multe pli. Ĉi tie partoprenos minimume 20 personoj, en nia emblema jara aranĝo.)

### **4. Problemo de Yagil, kaj ligitaj aspektoj**

Traktita dum la pasinta kunsido. Post lia hodiaŭa prezentado la Estraro konsideros eksigon el la Asocio, inkluzive jurajn paŝojn, ja liaj agadoj havas eĉ krimajn aspektojn.

### **5. Financoj** (Ŝlomo)

Ŝlomo disdonis la printitan buĝeton por la 2018-a jaro. Post kelkaj rimarkoj li faris etajn korektojn en ĝi. Sendos la korektitan buĝeton, kaj venontmonate oni voĉdonos por aprobi. [Intertempe li sendis ĝin al la estraranoj]

**La venonta kunsido:** la 9-a de Aprilo, 2018, 19:30

Protokolis: Gabi Zeevi